GISTO. MAR/2004
G.O.Vaske
Str.Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br

ttt-kongrua legaj'o

TREFO

En sia bulteno n°.10 Trefo rekomendas uzi, kiam eblas, la Fundamentan Alfabeton; kiam ne, g'i rekomendas uzi la NOVAn HELP-ALFABETOn = NHA.
Envere lertaj geesparantistoj ne bezonas signitajn literojn, la enmetitan H au ikson, por legi E-tekstojn. Oni ja scias, lau la grupo de literoj, kiu vorto g'i vere estas, krom kiam bezone elstarigi "c'apelitan" literon. Mi persone preferas meti X au H post la litero kiu devus uzi c'apeleton. Tiel la vortoj aspektas pli koheraj kun naciligvaj vortoj sed malpli angle.

TUTNACIA FORUMO PRI EDUKADO

Karaj gesamideanoj instruistoj/profesoroj, okazos granda evento pri edukado en mia urbeto S.Sebastião do Kai'-RS (Kaiurbo). Gxi estos bela oportuno por ensxovi la ideon ke, por teni la kulturon nialandan pura, oni nepre devas zorgi por ke la nacia lingvo restu pura, kun siaj dirajxoj farchitaj per oportunaj idiotismoj neniel plenplene tradukeblaj kaj ke, nenio taugas pli bone ol Esperanto, por eviti la poluon em nia gepatra lingvo. La evento okazos de la tago 20 – 22/05/04. Partoprenos gxin 650 instruistoj. Inter la invititaj prelegantoj audeblas jenaj elstaruloj: Celso Antunes, Danilo Gandin kaj Samuel Zukowski. Jen du telefonnumeroj per kiuj eblas rekta kontakto: 635.4545 kaj 635.1623.
Nia estimata kompano Lukas iam jam montrigxis tre kapabla preleganto en miaurba lernejo. Same nia valora aktivulo prof. Cezar devus fari chion eblan por prilumi la menson de tiom da kleraj homoj. Ne laste menciendas nia poligloto Paulo Ereno apud eble pliaj kapablaj homoj el nia trancheo, kiujn mi ankorau ne sufiche bone konas rilate al E-prezentado antau granda publiko. Por la enskribigxo mi helpos al almenau unu el vi. Karaj, manovru cele havigi al vi libertempon...manifestigxu.

Cho-Ro-I

Okazas terura QSB = fado en la radiofrekvencaj ondoj disvastigxoj rilate al certaj distancoj kaj kontinentoj. Krom tio, rilate al kurtaj distancoj, la propagado montrigxas eksterordinare favora, tiom ke (matene) por ni la frekvenco 9510 Khc audeblas mezgrade forte (5/4) sed brazila stacio, per spiritualisma programo ofte superregas tiel ke ne plu eblas audi nian aprecatan E-elsendojn de CRI. Lau la frekvencoj de la horo 22,00 UTC,9860 kaj 11.700 Khc, kun bedauro mi tro ofte konstatas QRM = intermikso, far nekonataj brodkastaj stacioj inkluzive de (lau mi) aziaj paroladoj similaj al la china parolmaniero. Mi tre bedauras la frekvenco-sxangxo kiun CRI faris antau kelka tempo. – Geamikoj sudamerikaj, provu auskulti la E-elsendojn, per eble pli bonaj R-riveviloj ol posedas mi kaj/au en pli favoraj situoj. Ne forgesu aldoni helpilon al via ricevilo = chirkau 10m kondukilo, ligita al la anteno, (drato) jxetita sur la tegmento, se via radio uzas teleskopan antenon. Havu pli bonan sxancon ol mi!

+ 7.150 Khc, je la 6ka matene.

GEA

Krom GEA-aktivuloj tutcerte pluraj gesamideanoj legis pri favora sxanco proponata de nialanda Posxto = ECT okaze de sia 35-jarigxo (Correio do Povo, 21/03/04, pg.15): per mallonga teksto ECT proponas presigi stampon, PM-grandan, sen afranka valoro, algluebla sur koverto che la vera PM, kun motivo omagxi, komence personojn. Chi glumarkoj estos presotaj lau petoj kaj rajtas vinjetojn kaj fotojn de elstaruloj. Vi, vere verdaj aktivuloj el GEA kaj ceteraj amantoj de nia paca celo, BV kontakti sinjoron Larry Medeiros de Almeida, por pliaj detaloj. Oni ja scias ke ege valoras urgxe mendi char tutcerte multaj homoj/organizajxoj profitos la sxancon konatigi sin al vasta publiko, preskau senkoste. Lau mi, ne multe valoras individua peto sed jes se organizajxo kiel GEA kandidatigos la figuron de nia majstro Z, au tiu de UEA-prezidanton, kp. kun eta teksto, nacilingve, kiel ekz.: PIONIRO de la PACO. – VI, chefurbanoj, responsas pri la perdo de tia bonsxanco.

VIV-URG'O

Tio, kion vi faris hodiau tre gravas
Char vi intersxangxas vian faritajxon kontrau unu vivotago via.
Tro longe oni atendas antau ol plenumi farendajxon
En mondo kiu proponas chiutage nur unu tutan tagon,
Sen iu ajn garantio pri la morgauo.
Tro longe oni atendas gxis prononci pardonpeton,
Kiu anstatauas malamikecon...por reanimi, por konsoli.
Dum ni ve-krias, ke la vivo estas tro kurta,
Samtempe ni agas kiel ulo kun stako da centjaroj disponebla.
Tro longe oni atendas korinklinon por ion donaci gxoje, spontanee.
Tro longe oni konsideras siajn geknabojn infanetoj,
Forgesante kiom rapide ili adoleskas kaj invadas la mondon.
Oni troe atendas, antau ol tutkarese prizorgi gepatrojn,gefratojn, geamikojn...
Por elmontri amon, kiu eble morgau jam estos vana.
Tro longatempe ni prokrastas niajn pregxojn...
Ankau Dio atendas ke ni chesigu atendadon kaj ke ni komencu
Tuj fari chion en chi-tago kaj chi-vivo, kreitaj por ni.

KULPULO

La plej dangxera surtera estulo, kiu senkompate detruas la mondon, estas dupieda mamulo.
Chu vi volas koni ties figuron? – Alrigardu spegulon.

BONHUMORO

- Doktoro, mia edzino komencis paroli dumdorme.
- Kaj, kion sxi diras?
- Sxi diras chiam la samon: "Ne, Jochjo, ne".
- Mi vidas neniun teruran en la dirajxo.
- Sed, doktoro, mia nomo estas Pechjo.
- Same ne gravas, sxi ja diras al li: Ne!"